# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de IKUE

=============== LA HOUSSAYE-eb-BRIE (Seine-et-Marne) FRANCE ==========

Sekretario : S-ro Jean BARRIER, 89, rue Roger Salengro, DRANCY -93-
Kasistino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux, -LES ANDELYS -27-

C.C.P.- Ligue Française Catholique Espérantiste - ROUEN - 2 324 93 K.-

---- Abono : 2 Fr,-- + Kotizo : 1 Fr,-- = Sume = 3 Fr,--

Redaktorino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux - LES ANDELYS -27-

Sendu la materialon por la bulteno antaŭ la 1-a de Januaro, la 1-a de Aprilo, la 1-a de Julio, la 1-a de Oktobro.

**=== N° 74 --- BULLETIN TRIMESTRIEL --- TRIMONATA BULTENO ============

Sankta Pio X-a, preĝu por ni.

--- Oktobro 1967 ---

KOMITATKUNVENO
Dimanĉon, 3-an de Decembro 1967, je 15 h 30 ,
- 34, rue de Chabrol, Paris -10-

E N H A V O :


| | | |
|---|---|---|
| paĝoj | 1 | Kristo estas Reĝo. |
| " | 2 | Vortoj de l'Koncilo. |
| " | 2 & 3 | Bileto de la Prezidanto. |
| " | 3 | Eĥo el Rotterdam |
| " | 3 | La progreso de la popoloj. |
| " | 3 | Gratuloj. |
| " | 4 | Tre grava informo !... |
| " | 4 | Kotiztabelo kaj dumvivaj membroj. |
| " | | |


## K R I S T O  E S T A S  R E Ĝ O .

" Levu, pordegoj, viaj kapojn; kaj leviĝu, pordoj antikvaj,
Por ke eniru la Reĝo de gloro.

Kiu estas tiu Reĝo de gloro ?
La Eternulo Cebaot,
Li estas Reĝo de gloro.

(el psalmo 24-9/10)

" ...Jesuo respondis : Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo; se mia regno estus el ĉi tiu mondo; miaj servantoj bataladus, por ke mi ne transdoniĝu al la Judoj; sed nun mia regno ne estas el ĉi tie. Pilato demandis lin : ĉu vi do estas reĝo ? Jesuo respondis : Vi diras, ke mi estas Reĝo. Por tio mi naskiĝis kaj venis en la mondon, ke mi atestu pri la vero. Ĉiu, kiu estas el la vero, aŭskultas mian voĉon. Pilato diris al li : Kio estas la vero ?

(el Sankta Johano 18,36/37)

## V O R T O J   D E   L' K O N C I L O.

Ni ja scias, ke ne utilas por la homo gajni la universon, se li mem perdiĝas; sed la atendado de nova tero, anstataŭ malfortigi ĉe ni la zorgon de la kultivado de la tero, devas pli bone revigligi ĝin : la nova homaro tie ĉi pligrandiĝas kaj skizas jam la estontecon. Tial, se oni devas zorgeme distingi la teran progreson de la kresko de la Krista regno, tiu tera progreso tamen multe gravas por la dia regno, en la mezuro, laŭ kiu ĝi povas kontribui al pli bona organizado de la homa societo.

Estontece ni retrovos dignecon, fratan samsenton, liberecon kaj ĉiuj bonegajn fruktojn de nia naturo kaj industrio, kiuj ni disdonis sur la tero laŭ la ordono de la Sinjoro kaj Lia Spirito, ded ili estos purigitaj de ĉiuspecaj fimakuloj, lumigitaj, transfiguritaj, kiam Kristo transdonos al Sia Patro la "Senfinan kaj universalan regnon : regno de vereco kaj vivo, regnon de sankteco kaj digraco, regnon de justeco, amo kaj paco". La regno estas jam mistere nuntempa sur tiu terglobo; ĝi atingos sian perfektecon, kiam revenos la Sinjoro.

(el Koncila deklaracio "Gaudium et Spes)
N°39 § 2 kaj 3

================================================================

## B I L E T O   D E   L A   P R E Z I D A N T O.

La paix soit avec vous ! Voici qu'une fois encore, les armes ont parlé, les pays ont été envahis, les populations ont fui, pour trouver des camps de misère, pour endurer des mois, des années de déracinement et voir leurs enfants grandir dans l'insécurité, la peur et la haine. Et ,comme un symbole, les participants du Congrés Universel d'Esperanto ont dû renoncer à se retrouver à Tel-Aviv et tenir leurs assises à Rotterdam.

Quel regret, sans doute, de n'avoir pu quitter notre occident pour aller affirmer notre universalité en ces pays comme au Japon il y a deux ans. Certes ces circonstances ont assombri ces jours où le rapprochement des peuples prend une forme à la fois concrète et familière, grâce à la langue internationale.

Pèlerins de la Paix, ceux qui ont adhéré, avec tout leur coeur, à la "Interna Ideo" de notre mouvement, sont profondément blèssés de ne pas pouvoir davantage dans ce monde déchiré, incapable de vivre fraternellement.

Mais c'est une tristesse encore plus grande pour nous chrétiens et espérantistes, car nous nous sentons plus que solidaires de tout ce qui est humain, nous nous savons fils du même Père, créés pour nous aimer, pour aimer Dieu et tous les hommes.

C'est une grande joie pour nous, cependant, de voir les croyants se rapprocher, de voir les chrétiens séparés depuis des siècles oser surmonter ce qui les divise, prier ensemble, ouvrir le dialogue. Il nous a été donné voici quelques années de rencontrer quelques uns des membres de KELI, espérantistes et protestants, et l'accueil du regretté chanoine Duvaux en sa paroisse St-Jean-de-Montmartre restera pour moi la préfiguration de ce que notre temps voit se réaliser à l'échelon le plus élevé.

IKUE, en l'année 1968, prépare un congrés qui aura le caractère d'une réunion oecuménique, car il sera commun avec celui de KELI; sans doute les participants seront encore entre occidentaux; il est peu probable que les Eglises d'Orient soient présentes. Mais leur pensée,

.../...

.../...
leur foi, le désir de mieux les connaitre pour les mieux comprendre, seront au milieu d'eux.

Et cette marche vers la Paix des âmes, dans la lumière de l'Esprit, c'est aussi, sur le plan terrestre, un pas de plus vers une entente des humains : aucun effort n'est vain avec l'aide divine que nous demandons, en répétant la prière de Jésus : "Qu'ils soient un", et en voulant ardemment vivre et travailler pour notre part à réaliser l'Evangile en nous et autour de nous.

R. Cl. COLAS.

---

## EĤO EL ROTTERDAM.

Pro la subita milito en Mezoriento, la LKK de la 52-a UK de Esperanto en Tel-Aviv urĝe devis ĉesi la preparlaborojn kaj la kongreso okazis en Rotterdam. Kiel kutime, la katolikoj havis sian kunvenon. IKUE tre deziras pli intime kunlabori kun Pax Christi movado. Se kelkaj liganoj havas ideojn pri la maniero realigi tiun kunlaboradon, ili bonvolu sendi artikolojn al la redaktorino.

La kutima diservo ankaŭ okazis je tagmezo en tute novkonstruita kapelo proksima al la kongresejo, sed ĉi jare tute en esperanto, laŭ la nova liturgio. Celebris kaj predikis sacerdoto Wannemerkers el Nederlando. Proksimume 200 gekongresanoj ĉeestis, inter ili kelkaj KELI-anoj. Interŝanĝe, kelkaj IKUE-anoj ĉeestis la proptestantan diservon, kiu okazis posttagmeze.

J.V.

---

## LA PROGRESO DE LA POPOLOJ. (1)

++++++++++++++++

Ĵus aperis la esperanta teksto de la encikliko de la Papo pri la evoluo de la popoloj "Populorum Progressio". Disvastiĝo de la civilizacio, kreskanta konscio, helpo de la évoluitaj landoj al la mem plialtigo de la vivrimedoj kaj de la propra tradicia kulturo, alfabetigado, estas la necesaj rimedoj por akceli la spiritan ekonomian kaj kulturan disvolviĝon de la homoj.

Kaj tiu senca evoluo, kiu devas esti la tasko de ĉiuj, sed precipe de la plej konsciaj, estas la sola vojo al la vera feliĉo de la homaro kaj al la paco en la universala frateco.

Ĉiu devas legi kaj diskonigi tiun dokumenton, kiu interesas la kredantojn kaj la ne kredantojn.

(1) Eldono Espero Katolika kaj Ekumena Esperanto.

---

## GRATULOJ ...

Ni gratulas nian amikon Francisko SIMONNET el Parizo, kiu ricevis, dum la Universal Kongreso en Rotterdam, la unuan premion ĉe l' Oratora Konkurso.

Li ankaŭ ricevis, en la Pariza Universitato, la Agregacion pri gramatiko.

Ni ĝojas pri tiuj ambaŭ sukcesoj.

---

## T R E  G R A V A  I N F O R M O ...

,,,,,,,,,,,,,

La 60-a nacia kongreso okazos en Aix-en-Provence de la 13-a ĝis la 16-a de Aprilo 1968. Por ke ni havu indan meson, la episkopo konsentas disponigi al ni la katedralon kaj ni invitis predikanton, kiun multaj el vi jam konas, sacerdoton Thalmaier, germanan gimnazian profesoron. Kompreneble, ni devas gastigi lin en Aix : tiucele, ni malfermas specialan fonduson por eblegi lian senpagan restadon. Bonvolu sendi vian donacon al la poŝtĉekkonto de la Ligo kun indiko : "Por restado sacerdoto Thalmaier en Aix".

C.C.P.- Ligue Françcaise Catholique Espérantiste.- ROUEN - 2 324 93 K.-

Dankon...

==========================================================================

## = K O T I Z T A B E L O =

| | |
|---|---|
| IKUE kun Espero Katolika ........................ | 15 Fr- |
| IKI kun Vojo,Vero,Vivo ........................... | 4 Fr- |

Via paranto : Gaston VERON, -C.C.P.- ROUEN - 11 88 63 Z.-

| | |
|---|---|
| UFE kun Revue Française d'Espéranto .............. | 20 Fr- |
| UEA kun Esperanto kaj Jarlibro ................... | 35 Fr- |
| LFCE kun Franca Katolika Esperantisto ............ | 3 Fr- |
| Dumviva membro de LFCE ........................... | 60 Fr- |

Pago al : "Ligue Française Catholique Espérantiste"
C.C.P.- ROUEN - 2 324 93 K.-

---

Multaj liganoj tute forgesis pagi sian kotizon de pluraj jaroj. Bonvolu kontroli vian kontlibron. Helpu la kasistinon fariĝante dumviva membro : vi ne plu havos zorgon kaj ricevos regule la bultenon.

---

## D U M V I V A J  M E M B R O J .

1 - F-ino Le Boêdec (Paris)
2 - Frato Marmou (Seine-et-Marne)
3 - Sacerdoto Péjoine (Gironde)
4 - S-ro Simonnet Jean (Val-de-Marne)
5 - S-ro Ribot André (Lot-et-Garonne)

......

==========================================================================

Dépôt Légal : 4e trimestre 1967 /// Polycopié par : F.M.C.-
Papier de presse : N° 34.745- /// Prieuré St-Martin à La Houssaye
Directeur-Gérant : Gaston VERON /// 77- TOURNAN-en-BRIE, FRANCE.

==========================================================================